

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1990 — 4

(OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... La franca himno



Georges Brassens



Paul Valéry

... La urbo de la du poetoj

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 Baugé

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la mondo (Frangeul)	2
Frumatene en Gresillon	3
La franca himno (H. Röllinger)	4-6
La urbo de du poetoj	7-8
La mizer-mildigantoj (E. Babin)	9
Paĝo de la geknaboj (B. Golden)	10
Monte-Kristo (trad. R. Dupuis)	11-13
Por via distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

Gresillon, kiel la pli multo el la asocioj en Francio (kaj verŝajne ankaŭ en aliaj landoj) pli kaj pli malfacile trovas sensalajrajn propravolajn helpantojn. Ĉu pro manko de tempo, de emo, aŭ ĉu pro la fakto, ke ni vivas en epoko, kiam la dio Profito havas pli da adorantoj ol la aliaj dioj, ne gravas. Proprasperte la respondeculoj de Gresillon scias, ke oni kelkfoje, ekster la movado, konsideras ilin mensoguloj aŭ admirindaj stranguloj pro tio, ke ili laboras senprofite. Tamen ili estas nur simplaj homoj, kiuj, kiel aliaj, provas konformigi sian agadon al siaj ideoj. Ili pensas, ke ju pli forta kaj sincera la ideo, des pli ampleksa la agado.

Feliĉe la gazetoj anoncas, ke, cele al pli facila "trovo" de propravoluloj, preparigas speciala leĝo-teksto, kiu permesus al la sensalajraj helpantoj, en kultura asocio, esti konsideritaj kvazaŭaj salajruloj rilate sociajn avantaĝojn. Ni atendu! Espereble tiu leĝo faciligo la funkciadon de Gresillon dank'al la necesa alveno de pliaj helpantoj. Ne hezitu, vi, kiu tiel utilus!

Zamenhof inventis Esperanton cele al Paco. Sed li neniam provis trudi veron al la aliaj. Ĉe la sojlo de la nova jaro, la deziroj de la esperantistoj iru al la paco inter la landoj, inter la religioj, inter la asocioj, inter la homoj. Helpas la alvenon de universala Paco tiuj, kiuj emas al ĉiutaga senmajuskla paco.

****

MEMORU! La nova adreso de Kulturaj Kajeroj estas:

Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain Rolland
85100-Le Château d'Olonne

Esperanto tra la Mondo

LA UNIVERSALA KONGRESO EN BERGEN-

La ministerio pri Kulturo asignis 10 000 nkr. por kulturaj aranĝoj dum la kongreso (27-7 ĝis 3-8).

Esperant-lingva vidbendo pri Bergen estas havebla: LKK, Boks 3160, Arstad, N-5029 Norvegio (50gld.)

Okazos dutaga antaŭkongreso en Oslo, 25/27-7 kaj trajn-vojaĝo al Bergen tra pitoreska pejzaĝo.

Pri la Internacia Infan-kongreseto respondecas: Christopher Fettes, St Columba's College, Rathfarnham, Dublin 16, Irlanda Respubliko.

La laponoj de Bergen prezentos programon kaj ekspozicion.

Tuj post la kongreso, ĝis la 8-a de aŭgusto, okazos en Voss, je 100 kilometroj de Bergen, la internacia konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Okazos postkongresaj ekskursoj en Norvegio kaj , eventuale, en Islando kaj Finnlando.

LERNEJAJ EKSPERIMENTOJ- S-ro Aŭgusto Casquero de la Cruz (Valencio, Hispanio) pretigas sciencan eksperimenton, uzota en lia doktoriga disertacio pri la propedeŭtika valoro de Esperanto por la lernado de fremdaj lingvoj en dulingva regiono, kiel Valencio. La eksperimento daŭros du jarojn en publika lernejo dum la oficialaj lernhoroj.

Eksperimenta Esperanto-kurso okazis en la ŝtata mezlernejo B. Lucarelli, en Benevento (Italio), kun 163 gelernantoj kaj 11 instruistoj. Alia simila kurso estis gvidata en la proksima Piedimonte Matese.

EL SOVET-UNIO- En la urbo Volĵskij 230 esperantistoj el sep landoj partoprenis la Internacian Festivalon de Esperanta Arto "Eola 90". En tiu urbo, la fako esperanto de la Turisma firmao "Orbita" proponas aranĝi vojaĝojn en USSR prefere per reciprokaj sendevizaj interŝanĝoj kaj akceptas ankaŭ individuajn turistojn. Esperanto-Orbita, Dmitrij Lisenko, ab; ja; 73, Volĵskij-30, Volgogradskaja obl. USSR-404130.

EL SLOVAKIO- Slovakia Esperanto-Asocio (Sobotské nam.6, CS-058 01 Poprad), instalis Internacian Kulturan kaj Klerigan Centron, kiu disponas pri loĝeblecoj por 70 personoj, du klasĉambroj, salono por 50 personoj, biblioteko kaj librovendejo.

EL ISRAELO- Nun funkcias Esperanto-Instituto en domo por eldonado, instruado kaj informado. Adreso: Esperanto-Instituto "I. Dratwer", str. Ĥelmit 16/2, Jaffa (Tel Aviv).

EL AZIO- Grupo de novaj esperantistoj fondis Tajvanan Esperantistan Asocion. Adreso: Wang Chung-Yi, N° 13, 2 Alley, 40 Lane, Chung Yung Str., Shih Lin, Tajpei, Tajvano.

Komunan Seminarion inter Koreaj kaj Japanaj Gejunuloj partoprenis 162 gejunuloj el 7 landoj. Estas projektoj por internaciaj kongresoj en Koreio en 1994.

Fondiĝis: Hanoja Esperanto-klubo, 46 str. Trân Hung Dao, Hanoï, Vjetnamio. - Bangalora Esperanto-Centro, p/a S.S. Pradhan, 97, III Block E., Jayanagar, Bangalore 560 001, Indio.

Dum la lastsomera Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, kiu okazis en Pekino, oni anoncis la projekton de Scienco-Teknika Instituto, kiu akceptos ĉinajn studentojn. La studento j lernos utiligi esperanton. Respondeculino esprimis subtenon al la fondo de internacia Esperanto-universitato, kiu varbu studentojn tra la tuta mondo.

EL RUMANIO- Laŭ decido de la tutlanda kongreso de esperanto, kiu kunigis pli ol tricent geesperantistoj, en julio, la adreso de Rumana Esperanto Asocio estas nun: Bd. V. Parvan 4, Universitate, R-1900 Timisoara. La prezidanto estas prof.Ignat Bociort.

SKISEMAJNO EN FRANCIO- La tradicia internacia skisemajno aranĝita de la francaj fervojistoj okazos en Les Contamines-Montjoie (2/9-2-91).

Claude Dugues, 8bis Av. Gal Leclerc, F-91580 Etrechy, Francio.

Frumatene...

Ĉar posttagmeze la varmega suno prilumas mian dormoĉambron, mi ĉiam fermas la fenestrojn kaj fenestrokovrilojn. Por ne sufoki vespere mi malfermas ilin tuj post la sunsubiro, kaj ili restas malfermitaj ĝis la mateno. Tiel, el mia lito, mi povas vidi parton de la arbaro ĉirkaŭ la kastelo.

Frumatene, precize je la sesa kaj duono, mi subite vekiĝis pro laŭta krio, kaj tra la fendo de la malfermitaj fenestroj mi vidis verdan pigon. "Mi venis per facila vento," ĝi diris," por memorigi al vi vian domtakson farendan. Sed mi ne plu havas tempon, ĉar mi havas novan senton iri en la mondon, kaj tial mi devas flugi al la 21-a etaĝo de "La Espero". Kaj for ĝi estis. Mi tuj ellitiĝis, lavis kaj vestis min, kaj iris el la kastelo en la ĉirkaŭan naturon. Unue mi elektis la vojon al la kampadejo. Sur arbo, apud iu aneksa kastela konstruaĵo, sidis kolombo, kaj kuniklo fuĝis en la arbustojn. Jen mi aŭdis la grakadon de korvo. Mi plu iris laŭ mallarĝa pado, kvazaŭ valeto inter du montoj. Sur la grundo mi vidis helikojn, kaj kompreneble mi evitis surtreti ilin. Akrido forsaltis. Fine mi atingis la motorciklan konkursterenon. Mi decidis reiri tra la arbaro. Bruna papilio akompanis min. Ankaŭ ĉiam muŝoj kaj kuloj, sed tio estis malpli agrabla. En la malproksimo mi aŭdis sonorilon de iu preĝejo, la kokerikadon de virkoko, la muĝadon de bovino kaj la bojadon de bienhundo. Estis la sepa kaj dekdu: jen la suno super la arboj, ruĝa bulo. Mi atingis la kastelon kaj promenis al la ne plu uzata vinberejo. Mi aŭdis grandan bruon de ĉaskornoj kaj vidis kelkajn ĉasistojn kun hundoj. Kaj tiel kruele finiĝis mia travivaĵo frumatena ĉirkaŭ la kastelo. Ho verda pigo, mi esperas, ke venontfoje mi ricevos taskon, kiu ne forrabos mian karan noktan ripozon! (Frankleno de Zusto)

Mi ĵus vekiĝis. Estas frumatene. En la kastelo, en la parko, ĉio kaj ĉiuj dormas. Ĉu vere? Tute ne. Ja oni ne plu aŭdas la noktajn bruojn: malbruas nun la strigo, la bufoj sub la ŝtonŝtuparo, la griloj. Sed nova vivo komenciĝas.

Mi eliras. Plezure mi flaras kaj enspiras la malvarmetan aeron. Post nokto, la vegetalaro renaskiĝas. La kreskaĵoj, hieraŭ vespere preskaŭ senakvaj pro tro forta varmeco, denove stariĝas. Maldika, aera brumo banas la herbejojn kaj malrapide forbloviĝas sub la sunradioj. Sur la folioj, sur la araneaj retoj, rosgutetoj trembrilas. La birdoj ne delonge vekiĝis. Mi haltas kaj ne moviĝante, ne bruante, kiel spiono, mi observas ilin. Birdeto maltimiĝas kaj trinkas rosguteton el folikavo. La rigidigitaj insektoj ankoraŭ ne aperas, sed la sperta sito trovas ilin piede de arbustoj. De tempo al tempo ĝia metalsonora kanto elsonegas. Oni aŭdas la gajajn vibradojn de babilemaj fringoj, kaj ankaŭ la belan kanton de la turdo ravas min. Pigo forflugas sur arbon. Mi ekmoviĝas, kaj bedaŭrinde frakasas branĉeton. Tuj misharmonia krio aŭdiĝas kaj blua birdo rapide forflugas el la alta kverko. Garolo ĵus alarmis la bestojn de la parko. Mi daŭrigas mian promenadon kaj atingas la pinaron. Piede de la arboj la grundo estas tapiŝata de sekaj pingloj. Tie, la pura, la aromplena aero ravas min. Timanta sciuro rapide suprengrimpas arbon kaj, kaŝante sin malantaŭ branĉon, spektemas al mi.

Nun la suno altiĝas en la ĉielo kaj jam varmigas la arbaron. Mi aŭdas forforan sonorilon. Oni ellitiĝis en la kastelo. Rapidu Monique! Reiru al la kastelo por matenmanĝi kaj lerni! (Monique Noël)

Tiuj du tekstoj, kaj ankaŭ pluraj aliaj estis libere verkitaj de la lernantoj de la meza kurso, kiel lingvo-ekzercado, en Gresillon, dum lastsomera aŭgusto.

La franca himno

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

Aprilon 1792 en Parizo. De 3 jaroj., la Francoj febras en la tumultoj de la Granda Revolucio, kiu originis en la "sturmo al la Bastille" la 14-an de julio 1789, kies datrevenon la Parizanoj solene festis. Tri tagojn poste sur la "Marsa Kampo" la Nacia Gvardio perforte dispelis ribelantan homamason, kiu postulis la detronigon de la reĝo Ludoviko la XVI-a. Ili rifuzis konstitucian monarkion laŭ la angla modelo; ili volis respublikon.

En Germanujo francaj elmigrintoj prepariĝas al milito kontraŭ la franca revolucio. Fine de 1791, la bavaran grafon von Luckner, ardan defendanton de la franca revolucio, oni nomumis en Parizo "Marŝalo de Francujo". Li komandas la francan "Armeon de Rejno". Komence de 1792, jen la demando: ĉu milito kontraŭ la eŭropaj imperiestroj, ĉu paco? Ankaŭ Ludoviko la XVI-a hezitas; li antaŭsentas la danĝeron kaj de venko fare de la revoluciuloj kaj de ilia malvenko. Ankaŭ la sinteno de la partioj estas necerta. La ĝirondanoj puŝas al milito por konservi la potencon; Robespierre kaj la Jakobenoj emas al paco kun la intenco uzurpi la potencon. La ĵurnaloj bruas, la kluboj diskutas, svarmas onidiroj; pro tio, la publika opinio plenas je emocioj, duboj, esperoj. Fine, la 20-an de aprilo, la reĝo deklaras militon al la aŭstra imperiestro kaj al la prusa reĝo. Dum la antaŭaj semajnoj regis granda tensio en Parizo, eĉ pli granda en la orientaj urboj. Ĉe la limo kolektiĝis soldatoj; ĉie oni varbas volontulojn kaj kontrolas fortikaĵojn. Ĉe la franca bordo de Rejno, la germana malamiko aperas konkreta realaĵo, kiun oni ekvidas de sur la turo de l'Straburga katedralo. Nokte oni aŭdas la rulsonon de la artileriaj veturiloj kaj la tintadon de armiloj. Sufiĉus unu vorto por tondrigi la prusajn kanonojn kaj rekomenci la miljaran batalon inter Germanujo kaj Francujo, ĉifoje en la nomo de la nova libereco sur unu flanko, kaj de la ĝisnuna ordo sur la alia.

25-an de aprilo 1792: stafetoj alportas el Parizo al Strasburgo la informon pri la militdeklaro. La tutan garnizonon atendas sur la ĉefplaco urbestro Dietrich, kun la trikolora skarpo ĉirkaŭkorpe kaj la kokardo surĉapele. France kaj germane li proklamas la militdeklaron. La muzikistoj ekludas "Ça ira!" petolan dancmuzikon, kiu iom post iom alprenas militan takton. Disiras la homamaso al ĉiuj stratoj; en kafejoj oni disdonas la proklamon: "Aux armes, citoyens! L'étendard de la guerre est déployé! Le signal est donné!" (Al armiloj, civitanoj! Disvolviĝis la milita standardo! Eksonis la signalo!), kiun ĉiuj ripetas. Kontraste al tiu vira entuziasmo ekestas sekreta timo ĉe la patrinoj pri la sorto de la filoj kaj ĉe la kamparanoj pri la sorto de la bienetoj. Sed barono Dietrich, aristokrato, aŭdas nur la voĉojn de l'optimismo. Li igas la tagon de la militdeklaro festotago. Li disponigas vinon kaj nutraĵon al la soldatoj, kaj invitas la oficiraron al vespera adiaŭa festo: svingo de la sabroj, ĉirkaŭbrakadoj, tostado. Ĉiuj kredas je la venko kaj ripetas la proklamon " Al la armiloj, civitanoj". Dum la tostado, urbestro Dietrich sin turnas al juna kapitano, Rouget, kiu duonjaron antaŭe verkis, okaze de la proklamo de la konstitucio, himnon al la libereco, por kiu Pleyel komponis muzikon, kaj kiun oni publike kantis. Ĉu Rouget ne povus krei ion similan pri la nunaj eventoj, por la Armeo de Rejno, kiu morgaŭ ekmarŝos al la prusa malamiko. Intertempe Rouget estis nobeliginta sin, tute senrajte, kaj sin nomis "de l'Isle". Por komplezi al lia urbestra moŝto, Rouget konsentas. Apudsidanta generalo petas, ke estu paŝ-viviga, patriota marŝkanto.

26-an de aprilo: la soldatoj sin pretigas por ekmarŝi, aliaj homoj por fuĝi. Kapitano Rouget

en sia modesta ĉambreto nerveme paŝas tien kaj reen; li memoras pri la proklamo " Al la armiloj, ĉivitanoj!", sed ankaŭ pri la timantaj patrinoj kaj kamparanoj. Li verkas la unuajn du versojn:" Allons enfants de la patrie, le jour de gloire est arrivé!" (Ek infanoj de l'patrujo, la venkotago alvenis!) Bone, sed necesis trovi la ĝustan ritmon kaj melodion. Li provludas per la violono. tuj akordiĝas ritmo, melodio kaj vortoj. Li plu verkas, entuziasmoplena, simple transskribante la vortojn aŭditajn sur la strato kaj dum la vespera bankedo ĉe la urbestro. Per la genio de tiu ununura nokto kunfandiĝas impresoj kaj ideoj en ununuran unuecon. Kapitano Rouget haste verkas vortojn kaj muziknotojn. Unu nokton la sorto dediĉas al li, por ke li iĝu kunulo de la kvazaŭ senmortuloj, por esti distingita per gloro eterna. " Amour sacré de la patrie, conduis, soutiens nos bras vengeurs. Liberté, liberté chérie, combats avec tes défenseurs!" (Sankta amo al la patruj', gvidu, subtenu niajn venĝemajn brakojn. Liberec', kara liberec', batalu kun viaj defendantoj!) Formiĝis la 5-a strofo, la lasta el unu kortuŝo. Antaŭ la ektagiĝo la nemortonta verko finiĝis. Rouget ĵetas sin sur la liton kaj profunde dormas. Vekas lin la katedralaj sonoriloj kun la bruo de la unuaj ekpafoj trans Rejno. Li konfuze memoras, ke io okazis... kaj ekvidas sur la tablo la skribumitan folion. Li legas ĝin, zumas la melodion kaj eksentas dubon. Li prezentas la verkon al apudloĝanta kamarado, kiu aprobas ĝin. Poste li vizitas la urbestron. Dietrich pianludas, Rouget kantas. S-ino Dietrich, ravita, promesas verki la akompanaĵon. Vespere gastoj aŭskultas kaj sin deklaras kontentaj. Fakte tia kanto ne taŭgas por solkantado, sed por milvoĉa amaso. Tamen, kuraĝigita de sporadaj laŭdoj, li kantas ĝin por siaj kamaradoj en kafejoj; li sendas kopiojn al la generalo de la "Armeo de Rejno". Laŭ ordono de Dietrich, la muzika korpuso de Strasburgo ekzercas la "Militistan Kanton por la Armeo de Rejno". Kvar tagojn poste, la Nacia Gvardio ludas ĝin sur la ĉefplaco. Eldonisto pretas presi tiun kanton. Tamen dum unu/du monatoj oni nenion aŭdas pri ĝi.

22-an de junio. En Marsejlo, la klubo de l'Amikoj de l'Konstitucio aranĝas bankedon por la forirontaj volontuloj. Ĉeestas 500 junuloj en siaj novaj uniformoj, ardaj, pasiaj, pro la suda temperamento, sed ne venkocertaj, ĉar la najbara malamiko profunde enpenetris la francan teritorion kaj la revolucio estas en danĝero. Unu el la soldatoj,



Mercier, ekstaras, petas silenton, kaj ekkantas:" Allons enfants de la patrie", kiun neniu iam aŭdis. Tuj regas entuziasmo; ĉiuj kantas kaj rekantas:" Aux armes, citoyens!". Pasantoj aŭskultas, kunkantas. Nova eldono disvastigas ĝin.

2-an de julio: la 500 volontuloj formarŝas; la kanto marŝas kun ili... Ĝi iĝis "ilia" kanto, la himno de ilia bataliono. Ne sciante, kie, kiam kaj de kiu ĝi estis kreita, ili alproprigis ĝin al si.

30-an de julio: la himno nomiĝas " La Marsejlezo". La marsejla batalion^o tramarŝas Parizon, kantante sian himnon. Tri horojn poste sonas la refreno el ĉiuj stratetoj. Forgesita "Ça ira". La revolucio trovis sian

kanton. Oni kantas ĝin en teatroj, kaj kluboj, eĉ en preĝejoj post la tedeumo kaj baldaŭ anstataŭ la tedeumo. Servan, la militministro, ordonas la disdonon de 100 000 ekzempleroj al ĉiu taĉmento. La malamikaj generaloj disponas nur pri eluzita recepto: duobla porcio da brando, sed ili konstatas kun teruro, ke nenio egalvaloras la potencon de tiu himno.

En sensignifa garnizono en Hüningen sidas nekonata kapitano, Rouget, inĝeniero, kiu desegnas projektojn pri remparoj kaj fortikaĵoj. Eble li forgesis la "Militan kanton por la Armeo de Rejno". La gazetoj ja skribas pri iu "Kanto de l'Marsejlanoj", sed li eĉ ne supozas, ke tiu "alia" kanto estas precize lia kreitaĵo. La gloro restas al la kanto. Oni ne citas lian nomon sur la presitaj tekstoj. Li restus tute en la ombro se li mem ne sin prezentus. Paradokse, la kreinto de l'revolucia himno tute ne estas revoluciulo. Kiam la pariza plebo sturmis la reĝan palacon kaj detronigis la reĝon, li konsideris la revolucion finita. Li rifuzis la ĵuron al la respubliko, preferis eksiĝi el sia ofico ol servi la Jakobenojn. Dietrich, ĉiuj oficiroj, kiuj unue aŭskultis lian kanton jam iris al la gilotino. Oni akuzas lin pri perfido al la patrujo kaj lin enkarcerigas. Pro la ekzekuto de Robespierre, malfermiĝis la malliberejoj; dank'al tio, oni evitis la honton, ke la aŭtoro de la revolucia nacia kanto mortis sub la "razilo de l'nacio". Pli ol 40 jarojn li postvivis la solan kreivan tagon de sia vivo. La sorto ne plu favoras lin. Li restas vundita, konfuza pro la krueleco de tiu hazardo, kiu faris lin geniulo dum tri horoj kaj poste lin reĵetis al nenio. Carnot, poste Napoleono, provas helpi lin, vane. Li sin kaŝas en la provinco, observas la sorton de sia kanto, kiu nun akompanas la venkantajn armeojn tra tuta Eŭropo. Fine Napoleono trovas ĝin tro revolucia kaj la Burbonoj tute malpermesas ĝin.

1830: la kanto revivigas sur la parizaj barikadoj. La "civitana reĝo" Ludoviko-Filipo eĉ koncedas al Rouget etan honoran pension.


1836:78-jara, li mortas en Choisy-le-Roi, tute forgesita.

1-a mondmilito: delonge la Marsejlezo estas nacia himno. Oni decidas entombigi Rouget, kiel la komence tute sensignifan leŭtenanton Bonaparte, en la Hotelonde la Invalidoj.

Hugo ROLLINGER

(el prelego farita en Gresillon la 14-an de Julio 1989)

****



al P. Babin, poŝtkonto Nantes 281361L

aŭ al via peranto:vidu liston sur la paĝo

La Urbo de la du poetoj

Sur la mediteranea mar-bordo, funde de la Golfo de Leono, piede de monto Sankta Clair (Kler), kuŝas la urbo Sete, sur mallarĝa terpeco inter la maro kaj la lago Thau (To). En tiu urbo naskiĝis en 1871 Paul Valery; kvindek jarojn poste, en 1921, venis en la mondon alia poeto, Georges Brassens. Ambaŭ pasigis sian junaĝon, ĝis la 17-a jaro, en Sete kaj poste vivis en Parizo. Paul Valery havis vivon monduman kaj diris, ke li fariĝis "speco de ŝtat-poeto". Georges Brassens vivis aparte, for de la homamaso. "Mi rezistis al la vivfacileco de tiuj, kiuj nur imitas alies vivon. Ne konscie, kiam oni daŭre frekventas la samajn personojn, oni fine parolas kiel ili, pensas kiel ili. Se ili estas stultaj ankaŭ ni fariĝas stultaj" Malsamaj poetoj, ili tamen estis sufiĉe ligitaj al sia urbo, kie ili dormas lastan dormon. La tombo de Paul Valery kuŝas en la tombejo Sankta Karlo, kiun li priverkis sub la nomo de Mara Tombejo, sed kiun la loĝantoj nomas "Tombejo de la Riĉuloj". La tombo de Brassens troviĝas sur la alia flanko de la monteto, en la tombejo de "Ramassis" (de "Senvaloruloj").

Antaŭ miloj da jaroj, sur tiu parto de la mediteranea marbordo, etendiĝis multaj golfetoj, kiujn fermis sablo alportita el la Rodana Delto de la maraj fluoj; nur restis kelkaj naturaj kanaletoj inter la lagetoj kaj la maro, kiujn oni nomas "grau" (gro). Laŭlonge de la jaroj aldoniĝis kelkaj homfaritaj kanaloj kaj, fakte, la haveno de Sete estis entute homfarita kaj, ankoraŭ nun, la homoj daŭre adaptas ĝis al la ekonomiaj postuloj.


De la suda flanko de la monto Sankta Clair la rigardo supervidas la maron; de la alia flanko ĝi malkovras la mirindan pejzaĝon de la lago Thau, kaj liniojn de montetoj kovritaj de "garrigues" (veproj); kiam la ĉielo estas sennuba oni vidas eĉ ĝis la montaro Cevennes.

Juna Georges multe ŝatis promeni bicikle kaj rondiri la lagon trairante la tipajn urbetojn. Ofte, kun sia patro, Georges biciklis orienten, laŭlonge de la Beaucaire kanalo, de la lagetoj Ingril, Vic kaj Maguelone (kie impone staras romania katedralo) al Palavas kaj ĝis Aigues-Mortes (Mortaj Akvoj), signita jam de malproksime de la Turo de Constance. Piede, li ankaŭ ŝatis supreniri la Monton Sankta Clair, inter la muretoj faritaj el simplaj, sencementaj ŝtonoj; inter la "baraquettes" (baraket), malgrandaj tipaj domoj. Sur la fasadoj grimpas ampelopso, kies branĉetoj interplektiĝas sur latajoj, formanta verdan laŭbon. Antaŭ jaroj, pro manko de akvo, tie kreskis nur dornaj plantoj, figarboj, migdalarboj kaj akacioj. Nun la tuta monto verdiĝis. Tie, kiam la temperaturo estas preskaŭ netolerebla en la urbo, la marventetoj alportas malvarmeton. Kun amikoj kaj najbaroj, sidante ĉe "pastis", aniza aperitivo, aŭ ludante "petanque" (globludado), oni bone, agrable, kviete vivas.

La loko estis jam malkovrita de la Romianoj, sed la haveno kaj la urbo datumas nur de la fino de la 17-a jarcento. Pro tio vidiĝas tie neniu historia monumento, neniu granda arkitekturaĵo, neniu granda ĝardeno aŭ vasta placo. Sed, matene, la leviĝanta suno prilumas unu flankon de la kajoj; kaj posttagmeze, kiam enombriĝas tiu flanko, prilumiĝas la alia kaj la fasadoj de la altaj domoj speguliĝas en la kvietaj akvoj de la kanalo: tiu spektaklo estas belega.

Tri pontoj transpasas la Reĝan Kanalon. Antaŭ jardekoj tiuj pontoj turniĝis por enlasi la ŝipojn, kiuj nun albordiĝas en la eksteraj basenoj. Alia baskul-ponto ebligas promenadon al la Pointe Courte (Mallonga Pinto). Tie kuŝas kvartalo vizitinda, kie vivas fiŝkaptistoj. Super la akvo staras kabanoj kaj sekiĝas nigraj retoj.

Ne eblas priskribi Sete kaj la tiean vivon, ne parolante pri



Eric Battista

la Sankta Ludovika festo. Ĉar tiam okazas la tipe langvedoka surakva turniro. Sur du boatoj movigataj de po dek remantoj, staras sur du elstaraj platformoj, du viroj, kiuj tenas en unu mano langan stangon, en la alia protektan ŝildon. Ĉiu provas faligi enakven la alian per frapo de la pinto de la stango sur la ŝildon de la alia. Unu boato estas ruĝa, la alia blua. Tamburo kaj hobojo ludas dum la tuta turniro.

Sete, urbo profunde ŝatata de siaj loĝantoj, alte taksata de la vizitantoj, urbo kie vivis du poetoj, kiuj atestis sian deziron reveni al sia naskiĝurbo post la morto, unu en la poemo "La Mara Tombejo", la alia en la jenaj versoj:

Ĝuste ĉe la marbordo, du paŝojn for
de la blua ondo,
Fosu, se eblas, komfortan trueton,
Bonan niĉeton,
Apud miaj amikoj, la delfenoj,
Laŭlonge de tiu plaĝo, kie tiel
fajna estas la sablo
Sur la Strando Kornica."



KULTURAJ KAJEROJ

deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn tagojn dum la venonta jaro.

Mizer-mildigantoj

En la marĉaj regionoj, kvankam ili kvazaŭ baniĝis en ĝi, niaj prapatroj tute ne ŝatis akvon. Trinkeblan akvon ili devis alporti de malproksimaj pli altaj terenoj. Ili provis kreskigi vitojn aŭ utiligis fruktojn, eĉ arboŝelojn por fari iajn vinaĉojn. Pli poste ili trinkis kafon, sed, okaze de fiŝkaptado aŭ de ĉasado, ili trinkis el la fosaĵoj mem. Por tion fari ili elektis lokojn, kie kreskis kanoj kaj junkoj, kies radikoj, laŭdire, filtris la akvon. Sed la korpa purigado estis iom malzorgata. Ĉu la reĝo Henriko-la-Kvara ne diris, ke li alte taksis la korpo-odoron de siaj amantinoj? Boligado de akvo okazis nur por tizanoj, sed ne por sterilizi la suĉbotelojn. Tiujn oni lavis per akvo el la proksima fosaĵo. Tamen, kiam iu vundis sin oni estis pli singardemaj: oni uzis urinon, sian aŭ alies!

La mortprocento altiĝis printempe kaj aŭtune ĉefe de novnaskitoj, pro "verda lakso", kaj de junaj novnaskintinoj, pro postnaskaj febroj. La suĉboteloj, la tukoj, la manĝilaro kaj kuirilaro estis lavataj en la akvoi de la fosaĵoj, sen sterilizo. Gejunuloj ofte mortis pro "pulmo malsano",ĉar la malsekeco kaj la printempaj kaj aŭtunaj nebuloj estis malsanigaj. La stagna kaj poluciita akvo kaŭzis damaĝojn. Kiam la avinoj prizorgis la bebojn dum la labor-horoj de la patrinoj sur la kampoj, ili kvietigis ilin per "suĉaĵo" farita el sukerpeco envolvita en nodita naztuko ofte malpura. La beboj sidis sur la tero aŭ sur malpura kovrilo kaj la suĉaĵo ofte falis. La avino ĝin nur viŝis aŭ "purigis" per poluciita akvo.

Kompreneble tiuj kutimoj okazigis gravajn malsanojn. Multaj infanoj mortis kelkmonataj kaj la gepatroj ofte malsanis. Sed la veraj kuracistoj estis ege malmultaj en la kamparo, ĉefe marĉa. La kamparanoj preferis sin turni al pli proksimaj "tuŝantoj", ĉarlatanaj apotekistoj,, gesorĉistoj, kiuj alportis feliĉon...aŭ malfeliĉon Ĉiu havis siajn receptojn,ungventojn, pomadojn, "specialaĵojn", ankaŭ kantojn, ekzorcadojn kaj preĝojn al iu Sanktulo. Ili vivis kun la mizeruloj kaj konis ilin; ili ne petis multe da mono. En ĉiu vilaĝo loĝis personoj nepre necesaj sed kiuj, ve!, respondecis pri multaj mortoj: la "akuŝigistinoj". Ilia ĉefa okupo estis helpado de la akuŝantinoj, kaj ankaŭ bapto de la beboj mortminacataj: la pastroj ne eniris domon, kie virino naskis infanon ĝis la ceremonio de la "resaniĝo" de la patrino, en la preĝejo. En ĉiuj malnovaj paroĥaj arkivoj oni trovas iliajn nomojn. Post 1789 ne plu ekzistis la profesio " akuŝigistino" sed ili bedaŭrinde aktivis dum la tuta 19-a jarcento, eĉ pli longe en kelkaj regionoj. Ili estis sindonemaj, sed tute ne konis eĉ la plej bazajn san-regulojn. Ili kunportis virusojn kaj mikrobojn de domo al domo. Dum longa tempo ili ankaŭ tualetis la mortintojn kaj estris la "koruson de la plorist-inoj".

Aliaj du kategorioj de "mizer-mildigantoj" ekzistis. Unue la "reartikigistoj", kiuj ankaŭ zorgis pri malsanaj bestoj, ĉar la best-kuracistoj, ne multaj, ne ŝatis iri al malproksimaj vilaĝoj. Tiuj reartikigistoj, kiuj, ne science sed sufiĉe bone ĉar praktike, konis anatomion, remetis torditajn artikojn kaj "riparis" la rompitajn membrojn. En la "profesio" la patroj transdonis al la filoj formulojn de balzamoj faritaj el plantoj, ofte efikaj. La dua kategorio estis pli danĝera kvankam ŝatata: la kolportistoj, senĉesaj vaguloj. Ĝenerale venantaj el malproksimaj regionoj ili vendis kontrabandaĵojn, okulvitrojn kaj laŭdirajn relikvojn de sanktuloj. Ili iris de farmo al farmo, provante eviti la ĝendarmojn. Ili sekrete donis al klientoj, boteletojn aŭ skatoletojn entenantajn "kuracilojn", ĉar tiam ne ekzistis la kontraŭ-gravediĝan pilolon. Oni nomis ilin "vendistoj de subita morto".

POR LA GEKNABOJ

Afrika popolrakonto

FRAĈJO KUNIKLO KAJ LA GUDROPUPO

Iam estis granda senpluveco. Ĉiuj riveroj en la arbaro sekiĝis. La bestoj kunvenis por decidi kion fari. La leono, la urso, la lupo, la vulpo kaj eĉ la kuniklo ĉeestis la kunvenon. Ili decidis fosi puton. Ĉiu volonte kunhelpis, sed la kuniklo diris, ke li ne volas labori.

" Se vi ne fosas la puton", diris la leono," vi ne trinkos ĝian akvon." La kuniklo nur ridis pri la leono. "Fosu la puton," diris la kuniklo. "Mi havigos al mi la akvon." Do la bestoj laboris kaj fosis la puton. Poste ili sattrinkis kaj hejmeniris dormi. La sekvan tagon ili vidis la piedsignojn de la kuniklo apud la puto kaj sciis, ke li ŝtelis akvon. Ili decidis postenigi gardanton ĉe la puto. La urso estis elektita gardostari kaj li okupis sian postenon ĉe la vesperiĝo. Baldaŭ la kuniklo venis el densejo kaj vidis la urson ĉe la puto. Unue la kuniklo ne sciis kion fari, sed poste li ekpensis pri plano. Li komencis kanti tre dolĉe. La urso, aŭdinte la muzikon, ekstaris kaj ĉirkaŭrigardis. " De kie venas tiu bela muziko?" li diris. La kuniklo daŭre kantis, kaj la urso, emociite pro la muziko, komencis danci, ĝis li malproksimiĝis multe de la puto. Tiam la kuniklo, jam ne timema pro la urso, iris trinki el la puto.

La sekvan tagon la bestoj koleris kontraŭ la urso, ĉar li estis tiel granda stultulo. Kvankam ili povis vidi la piedsignojn de la kuniklo apud la puto, la urso insistis, ke la kuniklo ne venis. Tiam la bestoj taskis al simio gardi la puton nokte, sed la samo okazis denove. Fine la vulpo diris: "Mi scias, kion ni devas fari. Ni faru gudropupon kaj starigu ĝin por gardi la puton ĉi-nokte." Ĉiuj bestoj konsentis. Ili komencis fari belan gudropupon, kiun ili metis ĉe la puton kaj iris hejmen por sia nokta ripozo. La kuniklo alvenis, vidis la gudropupon kaj komencis kanti. La gudropupo ne moviĝis. La kuniklo daŭre kantis, sed la gudropupo verŝajne tute ne aŭdis ion. Fine, la kuniklo alproksimiĝis, sed la gudropupo ne parolis. "Atentu," diris la kuniklo. "Flankeniru aŭ mi faligos vin!". La gudropupo ne respondis, kaj la kuniklo koleris eĉ pli. "Flanken aŭ mi batos vin per mia pugno!" la kuniklo kriegis. Neniu respondo. Do la kuniklo batis la gudropupon, sed lia pugno fiksiĝis en la gudro. Poste li piedbatis la gudropupon, sed liaj piedoj fiksiĝis, kaj li tute ne povis moviĝi. La sekvan matenon ĉiuj bestoj alvenis, kaj vidis, ke ilia projekto sukcesis. La kuniklo estis kaptita.

Vi ne plu ŝtelos akvon de ni," diris la leono." Nun ni detranĉos vian kapon".

"Ĝuste tiel mi volas morti," diris la kuniklo

"Do," respondis la leono," ni certe ne mortigos vin laŭ la maniero, kiun vi volas."

"Ni mortpafu lin!" kriis urso. "Ho, tio estas eĉ pli bona maniero morti," kveris la kuniklo.

"Mi scias, kion fari," diris la urso. "Ni ŝtopu lin per manĝaĵo. Poste, kiam li estas kiel eble plej granda, ni suprenĵetos lin en la aeron kaj lasos lin krevi, kiam li frapfalos sur la teron."

"Ne,ne!" kriis la kuniklo. "Ne ŝtopu kaj krevigu min." Do la bestoj metis la kuniklon en ŝrankon kaj manĝigis lin per dolĉaĵoj kaj kukoj ĉiutage, ĝis li estis sufiĉe dika. Poste ili portis lin al montet-flanko. La leono prenis piedon de la kuniklo kaj komencis pendole balanci lin. Fine, li suprenĵetis la kuniklon en la aeron. La kuniklo malsuprenvenis surpiede kun obtuza brubato, kriante:"Fraĉjo Kuniklo estas mi, Kaptu min, se povas vi"

tradukita de Bernard GOLDEN

MONTE KRISTO

Alexandre DUMAS

(Sekvo)

Traduko de R. Dupuis

Ni nun lasu Danglars, kiu, penetrite de l'genio de malamo, klopodas flustri al la orelo de l'ŝipekipisto perfidajn aludojn kontraŭ sia kamarado, kaj ni sekvu Dantes, kiu, trapaŝinte la tutan Canebiere iras al la strato de Noailles, eniras en dometon situantan maldekstre de l'Aleoj de Meilhan, rapide suprengrimpas la kvar etaĝojn de malluma ŝtuparo kaj, tenante la apogilon de l'ŝtuparo per unu mano, subpremante per la alia la batojn de sia koro, haltas antaŭ malfermeta pordo tra kiu oni povas vidi ĝis la fundo de malgranda ĉambro. Tiu ĉambro estas la loĝejo de patro Dantes.

Pri la ĵusa alveno de la "Faraono" ankoraŭ ne sciis la maljunulo; starante sur seĝo li, per tremantaj manoj, nun diligente aranĝis palisareton ĉirkaŭ tropeolo miksita kun klematoj kroĉ-grimpantaj al la dratplektaĵo de lia fenestro. Subite li sentis sin kaptita ĉe l'talio kaj bone konata voĉo ekkriis malantaŭ li:" Patro, mia bona patro!".

La maljunulo ekkriis kaj turniĝis, vidante sian filon fallasis sin en liajn brakojn, tute pala kaj tremetanta. " Kio okazas, patro?" demandis la junulo maltrankvila," Ĉu vi malsanas?" - "Ho ne, mia kara Edmond, mia filo, mia infano, sed mi vin ne atendis kaj la ĝojo...la surprizo de l'revido...tiel ne atendite... Dio mia! mi kredas, ke mi mortas!" -Nu, trankviliĝu, mia patro! estas mi, nur mi, tute simple! Laŭdire ĝojo neniam kaŭzas malbonon, tial mi eniris senaverte. Nu, ridetu do anstataŭ min rigardi tiel strange. Mi revenis, do ni devas esti feliĉaj." - "Ha, ĝojige, mia filo!" daŭrigis la maljunulo;"sed pri kia feliĉo vi parolas? ĉu vi ne plu forlasos min? Rakontu pri via feliĉo!" - "La Sinjoro min pardonu", diris la junulo," ke tiu feliĉo rezultas de funebro alifamilia! sed Dio scias, ke mi ne deziris tiun feliĉon tiamaniere. Iel ajn ĝi venis kaj pri ĝi mi ne sukcesas afliktiĝi. Aŭdu, patro. La brava kapitano Leclère mortis kaj, dank'al la protekto de s-ro Morrel, mi anstataŭos lin. Ĉu vi komprenas, patro? esti dudekjara kaj fariĝi kapitano kun cent luidoroj da salajro kaj parto de l'profitoj! Ĉu tio vere ne superas ĉion, kion juna maristo, tiel malriĉa kiel mi, povus esperi?" - " Jes, filo, estas ja ĝojige", diris la maljunulo. "Tial, per la unua monricevo mi volas aĉeti por vi dometon kun ĝardeno, kie vi plantos viajn klematojn tropeolojn kaj lonicerojn...Sed..patro, kio okazas al vi...patro...ĉu vi svenas?" - "Ne, sed..atendu iomete...ne estas grave."

Sed la fortoj mankis al la maljunulo, kiu renversiĝis malantaŭen. " Nu, nu", diris la junulo," trinku glason, patro. Tio revigligos vin. Kie estas via vino?" - " Ne serĉu, ne necesas", diris la maljunulo, kiu klopodis reteni sian filon. "Kial ne, patro? Montru al mi la lokon." Kaj li malfermis du aŭ tri ŝrankojn. "Ne utilas..." diris la maljunulo," ne plu restas vino." - "Ĉu vere ne plu restas vino?" demandis Dantes tute pala kaj alterne rigardante la kavajn senkolorajn vangojn de la maljunulo kaj la malplenajn ŝrankojn. Ĉu ne plu restas vino? Patro, ĉu eble mankis al vi mono?" - " Mankis al mi nenio ĉar vi revenis" - " Sed," balbutis Dantes viŝante la ŝviton, kiu fluis el lia frunto," mi donis al vi ducent frankojn ĉe mia foriro antaŭ tri monatoj." - "Jes, Edmond, estas ĝuste; sed tiam vi forgesis pagi ŝuldeton al najbaro Caderousse; li tion memorigis al mi aldonante, ke se mi ne pagus la sumon, li irus al S-ro Morrel por peti la repagon. Komprenu; mi timis, ke tio kaŭzos al vi malutilon..." - "Kaj tiam?" - "Nu...tiam mi pagis." - " Sed," ekkriis Dantes "Mi ja ŝuldis al Caderousse cent kvardek frankojn!"

"Jes", balbutis la maljunulo. "Ĉu vi lasis al li tiom el la ducent frankoj, kiujn mi donis al vi?" La patro jese kapsignis. "Tiel, ke restis al vi sesdek frankoj por via vivteno dum tri monatoj," murmuris Edmond. "Ho vi scias, kiel malgrandaj estas miaj bezonoj." - "Dio mia! pardonu min, patro!" kriis Dantes ekgenuante antaŭ la maljunulo. "Kion vi faras?" - " Ho, vi disŝiris mian koron". -"Sensencaĵo! vi nun estas hejme; ni do forgesu tiun bagatelon" - " Jes, mi ree estas hejme kun bela estonteco kaj iom da mono. Prenu, patro; prenu kaj petu iun tuj aĉeti por vi kelkajn bezonaĵojn." Kaj li malplenigis siajn poŝojn elĵetante ilian enhavon sur la tablon: dekduon da ormoneroj, kvin aŭ ses kvinfrankajn erojn kaj iomete da soldoj.

La vizaĝo de l'maljuna Dantes ekradiis. "Al kiu apartenas tiom da mono?" li demandis. "Al mi, kompreneble!...al vi!...al ni! Prenu tiom, kiom vi bezonas kaj estu feliĉa. Morgaŭ venos plia ". - "Atendu, atendu," diris la maljunulo ridetante;" kun via permeso mi elspezos modere. Se oni vidus min tiom aĉeti en unu fojo, oni kredus, ke mi estis devigata atendi vian revenon por tion fari." - " Faru laŭplaĉe; sed unue vi devas dungi servistinon; mi volas, ke vi ne plu restu sola. Mi havas bonegan tabakon kaj kontrabandan kafon en la holdo; mi donos tion al vi morgaŭ. Sed...silentu! Mi aŭdas paŝbruon." - "Estas Caderousse, kiu aŭdis pri via reveno; eble li deziras bonvenigi vin". - "Jen lipoj, kiuj diras ion dum la koro pensas alion", flustris Edmond; "sed iel ajn li estas najbaro, kiu antaŭlonge faris al ni servon; li estu bonvena".

Efektive, ĝuste kiam Edmond mallaŭte finparolis, aperis, enkadrigita de la ŝtupara pordo, nigro-hara barbohava Caderousse. Li estis viro dudek-kvin aŭ dudek-ses-jara; li tenis ĉemane drapotukon, el kiu, kiel tajloro, li deziris fari frak-refaldaĵon. "Nu! ĉu vi revenis, Edmond?" li demandis kun plej forta marsejla akcento kaj kun larĝa rideto malkovranta liajn dentojn eburoblankajn. "Kiel vi vidas, najbaro Caderousse kaj mi daŭre estas je via servo se vi deziras", respondis Dantes kun malbone kaŝita malvarmo en la tono. "Dankon, dankon; feliĉe mi nenion bezonas; male, ofte bezonas min aliuloj. Mi ne diras tion speciale al vi, kamarado. Vi pruntis de mi monon kaj vi redonis ĝin al mi; tio estas kutimo inter najbaroj; ni estas kvitaj." - "Oni neniam estas kvita al sia helpinto", diris Dantes; "ĉar post la repago oni ŝuldas dankemon" - " Nu, ne plu parolu pri tiu afero. Ni parolu pri via ĝojiga reveno, kamarado. Mi iris al la haveno por akiri sortimentan brunan drapon kaj renkontis amikon Danglars; ĉu vi estas en Marseille? mi demandis. -Ŝajnas, ke jes, li respondis. -Mi kredis, ke vi estas en Smyrna - Tio povus esti; mi ĵus estis tie. - Kaj kie estas nia kara Edmond? - Nu, probable ĉe sia patro, respondis Danglars..."Mi do venis" daŭrigis Caderousse," por havi la plezuron premi amikan manon." - " Bona Caderousse! Li tiel ŝatas nin!" diris la maljunulo. "Certe mi vin ŝatas kaj ankaŭ vin estimas, ĉar honestaj homoj estas maloftaj! Sed ŝajnas, ke vi riĉiĝas, kamarado" daŭrigis la tajloro kun oblikva rigardo al la oro-manpleno, kiun Dantes lasis sur la tablo.

La junulo rimarkis la enviofajreron, kiu lumis en la nigraj okuloj de lia kunparolanto. "Ho, Dio mia," li diris indiferente,"tiu mono ne apartenas al mi; mi esprimis al mia patro mian timon, ke li eble suferis ian mankon dum mia foresto. Por trankviligi min li malplenigis sian monujon sur la tablo. Nu, patro," aldonis Dantes," remetu tiun monon en vian ŝparskatolon; tamen se najbaro Caderousse siavice iom bezonas,, tiam ĝi estas je lia dispono!" - " Tute ne kamarado" diris Caderousse", mi bezonas nenion, ĉar dank'al Dio la metio nutras sian praktikanton; sed mi estas al vi danka pro tiu propono same

kvazaŭ mi ĝin akceptus" - "Elkora propono" diris Dantes. "Pri tio mi ne dubas. Kaj vi ĝuas la estimon de S-ro Morrel, ĉu ne?" - "S-ro Morrel ĉiam estis tre bona por mi" respondis Dantes. "Nu, vi malpravis kiam vi rifuzis lian manĝinviton." - "Ĉu vi rifuzis manĝinviton?" interrompis la maljuna Dantes. "Ĉu li invitis vin al manĝo?" - "Jes, patro" respondis Edmond, ridetante pro la miro, kiun tiu granda honoro kaŭzis al lia patro. -"Kaj kial do vi rifuzis, mia filo?" demandis la maljunulo. - "Por pli frue reveni al vi, patro" respondis la junulo;"urĝigis min la sopiro vin revidi." - "Tio certe ĉagrenis la bonan sinjoron Morrel," daŭrigis Caderousse,"kaj kiam oni volas fariĝi kapitano oni ne rajtas neglekti sian ŝipekipiston." - "Mi klarigis al li la kaŭzon de mia rifuzo kaj espereble li ĝin komprenis." - "Ho, por fariĝi kapitano necesas iom flati siajn mastrojn." -"Mi esperas kapitaniĝi sen tia rimedo" respondis Dantes. "Bone, bone! tio plezurigos ĉiujn viajn malnovajn amikojn, kaj mi konas iun tie, malantaŭ la fortikaĵo Sankta Nikolao, kiu tion ne bedaŭros." - "Ĉu Mercedes?" demandis la maljunulo. -"Jes, patro", respondis Dantes,"kaj nun, ĉar mi revidis vin, kaj scias, ke vi bone fartas kaj havas ĉion bezonatan, mi petas vian permeson fari viziton al "La Katalunoj". - "Iru, infano mia", diris la maljuna Dantes;"Dio vin benu kun via edzino same kiel li benis min kun mia filo." - " Ĉu lia edzino?" demandis Caderousse;" kiel rapida vi estas, patro Dantes! Tio ŝi ankoraŭ ne estas, ŝajnas al mi!" - "Ne, sed tute probable ŝi tre baldaŭ estos", sonis la respondo de Edmond. "Iel ajn, iel ajn," diris Caderousse, "estis saĝe rapidi, mia knabo." - "Kial?" - "Ĉar Mercedes estas bela knabino kaj al la belaj knabinoj ne mankas amantoj; precipe al tiu, kiun postkuras dekduo da ili." - "Vere," diris Edmond kun rideto el kiu sentiĝis nuanco de malsereniĝo. "Ho, jes,"daŭrigis Caderousse, " eĉ enviindaj kandidatoj; sed, kompreneble, fariĝonte kapitano, vi persone ne riskas rifuzon!" - "Tio signifas," aldonis Dantes, kun rideto, kiu ne sukcesis kaŝi lian maltrankvilon,"ke se mi ne estus kapitano..." - " He,he!" faris Caderousse. -"Nu feliĉe, mia opinio pri virinoj estas pli bona ol via, speciale koncerne Mercedes; kaj mi estas konvinkita pri tio, ke ĉu mi fariĝos kapitano aŭ ne, ŝi restos al mi fidela." - " Des pli bone!" diris Caderousse," ĉiam decas montriĝi fidema antaŭ la geedziĝo; sed iel ajn, kredu min, knabo, ne perdu tempon; rapidu al ŝi por anonci vian alvenon kaj diri vian esperon." - "Mi iras", diris Edmond.

Li kisis sian patron, per signo salutis Caderousse kaj eliris. Caderousse restis plian momenton, kaj adiaŭinte la maljunan Dantes, li malsupreniris kaj revenis al Danglars, kiu atendis lin ĉe angulo de la strato. "Nu," demandis Danglars, "ĉu vi vidis lin?." - "Juse", respondis Caderousse. "Ĉu li parolis al vi pri sia espero fariĝi kapitano?" - "Pri tio li parolas kvazaŭ estus jam okazinte" - "Paciencon!" diris Danglars, "li iomete tro rapidas." - " Sed ŝajnas, ke S-ro Morrel promesis tion al li." - "Tiel, ke li ĝojas, ĉu ne?" - "Li eĉ fariĝas impertinenta; li jam faris help-proponojn al mi, kvazaŭ li estus potenculo; li proponis monprunton al mi kvazaŭ li estus bankisto" - " Kaj vi rifuzis?" - " Certe; kvankam mi rajtus akcepti ĉar mi mem metis en lian manon la unuajn arĝentajn monerojn, kiujn li ricevis.. Sed nun li bezonos neniun: li fariĝos kapitano." - "Ho, tion li ankoraŭ ne estas!" diris Danglars. "Des pli bone," diris Caderousse, "ĉar tiuokaze li ne plu estus alparolebla." - "Se ni tion volas," daŭrigis Danglars," li restos tiu, kiu li estas; eĉ, eble, li malprogresos." - "Kion vi diras?" - "Nenion; mi parolas al mi mem. Li daŭre amas la belulinon de "La Katalunoj", ĉu?" - "Freneze. Li iris tien; sed aŭ mi eraras, aŭ li spertos malagrablon. - " Klarigu!" - " Ĉu necesas tion rakonti?" - " Estas pli grave ol vi pensas. Vi ne ŝatas Dantes, ĉu ne?" - "Mi ne ŝatas la arogantulojn!"

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

KIE DU INTERNATALAS, ... /daŭrigo en la kruc-enigmo./



NOVA ENIGMO

La solvo konsistas el 76 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj helpe de la sekvantaj ŝlosilvortoj:

6-2-1-26-41-5-33-32-9 = sudamerika lando.

19-16-41-20-10-15-22 = parto de kasko.

3-43-13-34-11-4-39-8-18-67-7-44 = parto de Rumanujo.

31-29-23-24-14-12-35-34-55 = sudazia lando.

27-56-62-74-65-68-28-50-67-71 = infanmalsano.

30-21-37-36-25-45-75 = nordeŭropa lando.

46-23-40-64-49-57-56-42-32-9 = dubema homo.

17-47-72-59-38-53-60-23-22-31-44 = altega pastro.

63-51-48-70-61-55-76 = ĉeñoslovakia montaro.

69-66-72-4-34-7-3-16-52-73 = malprovizore.

54-58-39-49-25-15-71 =granda birdo.

1....76 = pripensinda sentenco de iu orienta filozofo.

LA VIVO EN GRESILLON

Komitat-kunveno - Dimanĉon la 14-an de oktobro 1990

Ĉeestas la kunvenon: D. kaj P. Babin, S. Bourot, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, G. Dairon, G. Lagrange, P. Mêtivier, P. Naulet, J. Vincent. Senkulpiĝis la aliaj komitatanoj.

Staĝoj 1990: La nombro da staĝanoj estis proksimume la sama, kiel la antaŭan jaron. 2845 tranoktadoj estis registritaj kontraŭ 3288 en 1989, sed tiam okazis staĝo de KER, kiu kunvenigis 60 personoj dum 5 tagoj. Aliĝis saman procenton da ne-francparolantoj, kiel la antaŭajn du jarojn: preskaŭ 50%. Ankaŭ kiel kutime la kursgvidantoj renkontis kelkajn malfacilaĵojn por dispartigi la staĝanoj en la diversajn kursojn pro la ne ĝusta kono de la niveloj, kiujn eĉ la kursanoj ne povas ĝuste taksi. Finfine estis necese organizi kvar kursojn anstataŭ tri por kontentigi ĉiujn. La prelegoj estis tre kontentige ĉeestataj. La komitato decidas, ke estos proponitaj al la kursanoj, la unuan matenon de ĉiu staĝo, testo-provaĵoj por, kiel eble plej precize taksi ilian lingvo-konon.

La ekskursoj per aŭtobuso renkontis malgrandan sukceson ĉar la staĝanoj preferas ekskursi per propraj aŭtomobiloj.

Staĝoj 1991- Ili okazos laŭ la sama dispartigo, kiel kutime. Nur ŝanĝiĝos la datoj. La printempa staĝo okazos de la 24-a de aprilo ĝis la 5-a de majo: Praktika formado de Esperanto-instruantoj kaj Internacia renkonto de infanoj; administros: L. kaj P. Babin, kaj P. Naulet. La someraj staĝoj komenciĝos la 17-an de junio kaj finiĝos la 2-an de septembro. Administros: L. kaj P. Babin, D. kaj N. Babin, D. kaj J. Moirand, R. Lloancy, R. Lenel, J. Vincent. Gvidos kursojn: M.J. Berger, E. Bondar, P. Grzybowski, R. Lloancy, D. Moirand, J. Vincent. Krom Cseh-kurson Eva Bondar gvidos seminarion por estontaj Cseh-instruistoj. G. Lagrange instruos la "arton traduki" de la 23-a ĝis la 31-a de julio. La ĉefa temo de la preleg-serio de la 9/22-a de julio estos: Historio de Eŭropo tra la verkoj de Baghy kaj Kalocsay".

Ankaŭ venontjare la ekskursoj kaj vizitoj estos organizitaj laŭ la deziroj de la partoprenantoj. La komitato decidas, ke 5-a eldono de la lerno-libro "Por la Praktikantoj" estos presita, ĉar la 4-a eldono jam preskaŭ elĉerpiĝis kaj mendoj regule alvenas.

Henri Boyet estas elektita delegito de la Kultur-domo al la kunveno organizota de Literatura Foiro dum la U.K.-Kongreso en Bergen.

D. Babin proponas kolektivajn laborojn en la kastelo dum la Paskaj ferioj kaj esperas, ke venos kelkaj volontuloj.

La fiska kontrolisto decidis apliki la principon de T.V.A. pri la kontoj de E.K.D. koncerne la gastigadon sed ne pri la kulturaj enspezoj. Estas forlasita la projekto pagigi al E.K.D. la "societan imposton". Estas nun necese dispartigi la konton "kulturo" de la konto "gastigado". La Kultura Asocio de la Kastelo Gresillon respondecos pri la organizado de la staĝoj kaj la aliaj kulturaj aranĝoj.

La prezidanto fermas la kunsidon je la 16-a horo.

La sekretario: G. Dairon

LIBRO-SERVO

Aldone al la ordinaraj katalogoj (novaj kaj brokantaj libroj), la kulturdomo de nun proponos aŭkciojn laŭ la eblecoj. Vi trovos ĉi sube la unuan oferton kun la bazaj prezoj. Skribu al S-ino VINCENT, 26 bis rue de Milngavie, F-49150 BAUGE, por proponi vian prezon; ricevos la libron, kiu plej altpreze ofertos.

1- MEMORLIBRO DE LA ZAMENHOF-JARO (I. Lapenna) 1960. 104 p. + fotoj. Tole bindita 29 x 22 cm. : 70 ff.

2- TIO,KION MI KREDAS (J. Rostand) 1962. 39 p. Subskribita de la aŭtoro. Broŝurita 19 x 13 cm. : 30 ff.

3- SINJORO TADEO (A. Mickiewicz) 1955. 334 p. Tole bindita 21 x 15 cm.: 70 ff.

4- LES MOTS ESPERANTO GROUPES SELON LE SENS (M. Bobin) 1927. 160 p. broŝurita 17 x 12 cm.: 15 ff.

5- LETEROJ DE ZAMENHOF a) vol.1 1948. 367 p. Prezentado kaj komentado de G. Waringhien. Tole bindita 20 x 14 cm.
b) vol.2. 372 p. Ambaŭ : 150 ff.

6- FUNDAMENTO DE ESPERANTO, esperanta parto:Gramatiko, ekzercaro 1931. 36 p. broŝurita 18 x 11 cm. : 15 ff.

7- LA DORMANTO VEKIĜAS (H.G. Wells) 1929. kartone bindita. 210 p.. 19 x 12 cm. : 30 ff.

La sendkostoj estos senpagaj.

NE FORGESU! Haveblas niaj eldonaĵoj:

"Por la Praktikantoj" (P. Babin), ilustrita de Laurence Poueymarie. Vigla lernolibro por la praktikanto. Prezo: 30 ff. Rabato por Libro-servoj kaj grupoj laŭ la kvanto.

Niaj perkorespondaj kursoj. tri niveloj. Kurso programita por la komencantoj. (petu informojn).

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

esperantigis R. DUPUIS

bonega traduko de ĉefverko
(vidu eltiraĵon, paĝo 10)

Prezo : 36,00 FF

NIA KONKURSO

Tiu konkurso, kies unua serio aperis en la numero 1990-1, proponis jam tri seriojn de enigmoj kaj demandoj. Sube vi trovos la kvaran kaj **lastan** serion. Ankaù tiu serio povos doni al vi ĝis 20 poentoj. La partoprenantoj devos esti sendintaj la respondojn al tiuj kvar serioj **antaù la 15-a de februaro 1991** al la nova adreso :

Le Haut des Bourrelières, 17, rue Romain-Rolland, 85100 Le Château-d'Olonne. Ni memorigas, ke la premioj estas :

1 — 1 000 f.f. por restado en Gresillon ;
2 — 500 f.f. por restado en Gresillon ;
3 — 250 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo ;
4 — 150 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo ;
5 — 100 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo.

KVARA SERIO

1 — Jen la nomoj de kvin konataj esperantistaj aùtoroj. Bonvolu kompletigi ilin aldonante la mankantajn vokalojn :

— lb — rt G — —dh — —r ; G — — rg — K — m — ĉ — ; — l — — rb — n — v — ;
L — j — s T — rk — n — ; St — ll — n — ngh — lm.

2 — La respondoj al la subaj demandoj trovigâs en tiu ĉi numero de la revuo. Atente legu ĝin.

— Kial la verkinto de la franca himno favore akceptis la ekzekuton de Robespierre ?

— Ĉu Paul Valéry kaj Georges Brassens kuŝon en la sama tombejo ?

— Kion la juna Brassens ŝatis fari frumatene ?

— Ĉu Rouget de l'Isle estis nobelo ?

— Kiujn bruojn oni povas aùdi frumatene en Gresillon ?

3 — Jen la nomoj de kvin grandaj urboj. En unu el ili okazis neniu kongreso internacia, nek de UEA, nek de SAT. Kiu ?

Aûgsburg — Toronto — Hamburg — Tel Aviv — Helsinki.

4 — Ĉu la subaj asertoj estas veraj aù ne ? Respondu per « jes » aù « ne ».

— La signifo de PIF estas : Poŝta Internacia Federacio.

— « Sennacieca Revuo » ekaperis en 1921.

— Neniu kongreso de UEA aù SAT okazis en Afriko.

— Biografioj de Kalocsay kaj Baghy aperis en « Ora Duopo » en 1970.

— La Magnetofona Servo de UEA estis fondita en 1960.

Niaj perantoj

Aûstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aûstr. ŝil.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7,50 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).
Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).
Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).
Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.
Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).
Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 21 Rama Crescent Khandallah - Wellington 4 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).
Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ.
Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 2012-3 (70 kr.).
Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aû 25 internaciaj respondku ponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F - 49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.P.P.A.P. 71.404 Le Gérant : P. BABIN